Terakota Armeo

La Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de la dinastio Qin (aŭ *Muzeo de Terakota Armeo*) estas unu el la plej grandskalaj, plej karakterize strukturaj kaj plej enhavo-riĉaj maŭzoleoj de la mondo. En la ĉina historio, *Ying Zheng*, nome la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, estis ambicia suvereno. Li surtroniĝis en la aĝo de 13 jaroj. En 10 jaroj li konkeris la aliajn 6 regnojn, unuigis Ĉinion, kaj fondis la unuan centralizisman feŭdan dinastion *Qin* (221-206 antaŭ nia erao) en la ĉina historio.

Nelonge post sia surtroniĝo, *Ying Zheng* komencis konstruigi por si mem maŭzoleon ĉe la piedo de Lishan-monto, oriente de la nuna urbo Xi'an. 720 000 homoj partoprenis en la konstruado, kiu daŭris 37 jarojn. Historiaj libroj notas, ke sur la maŭzoleo estis haloj, dormohaloj, turoj, pordegoj kaj muroj internaj kaj eksteraj. Ili estis ekstreme luksaj. Subtere estis ne nur palacoj kaj sidlokoj de la korteganoj, sed ankaŭ multaj trezoroj. Tie estis riveroj kaj lagoj el hidrargo. La maŭzoleo estis ekipita per multaj kaŝitaj sagpafiloj kontraŭ ŝtelado. Oni diras, ke antaŭe, kiam kamparanoj tie fosis puton aŭ konstruis tombon, ili ofte vidis "monstron", kiu kaŭzis aŭ subitan disfalon de la tombo aŭ subitan elĉerpiĝon de la putakvo. Foje la "monstro" eĉ staris sur la putmuro, kun larĝe malfermitaj okuloj kvazaŭ rigardantaj la laborantojn.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Terakota_armeo